

mantika, sed nur etimologia rilato, kaj ĉar Z a m e n h o f preferis la francforman *konkeri* — ĉi-lasta sukcesis iĝi tradicia en nia lingvo; neniu sentas sin ĝenata de tio. (Ŝajnas ke ĝin unua uzis S e n t i s.)

Tute kontraŭe ĉe „*sovjet*”: unu ĉeĥa esperantisto, A. F r a n t l, eĉ opinias, ke ĝi „estas malfacila, severe fonetike prenite preskaŭ neespri-mebla” („*Heroldo de Esperanto*”, No 1284, 1.IV.1959). Dum la Zamenhofeco kaj larĝa internacieco de „*sovjet*” pruvas, ke ĝi estas ĉial supera al la monstro „*sovjet*”, fuŝa *kalkeo*⁷⁾ (= vortpaŭsaĵo, laŭ A. F. *calque*, I. *calco*, R. *kal'ka*, k.a.), enkondukita de personoj, kiuj plene ignoris la menciitajn kriteriojn, kiujn mi opinias decidigaj. Kiam ekzistas neniu malhelpo, la internacieco en lingvo *aŭtente* internacia devas nepre triumfi, konforme al § 15 de nia *Fundamenta Gramatiko*, kiu pri fremdvortoj konsilas sekvi la „plimulton de la lingvoj”. Tiu plimulto ĝuste konas kaj uzas formojn analogajn al la tial ĝenerale akceptenda, korekta formo „*sovjet*”. La rusaj esperantistoj atentu tion ĉi!

ĝ) Pro la bezono de precizaj kaj internacie kompreneblaj terminoj en la lingvoscienco mi, spertinte la postulojn de tiufaka esplorado, ekhavis la ideon proponi terminojn vere utilajn en tiu disciplino; „*paŭsi*” ne konformiĝas al la diritaj kriterioj; ĝi estas ne-oficiala vorto, proponita de V e r a x („*Enciklopedia Vortareto*”, 1910, p. 178) kaj enlistigita ja nur en la *Suplemento* (1954) al la 4a eldono de „*Plena Vortaro*”⁸⁾, kie la troveblaj difinoj ne rilatas al lingvistiko.

Surbaze de la „*Leksikono*” (3a eld., 1951) de prof. M a r o u z e a u, kaj de aliaj fidindaj verkoj, mi nun preparas tutan fakvortaron, el kiu la proponataj terminoj *leksiko* kaj *kalkeo* (supre aplikitaj) estas nur ekzemploj, respondantaj al la konstatitaj postuloj en la lingva kampo.

„eble preferinda pro analogio al *akiri*”. Sed vasta internacieco per si mem mankas en ambaŭ kazoj. En la unua parto (1909) de sia *Vortaro* (je p. 165) B o i r a c indikis per steleto, ke li mem enkondukis *konker'i* (el S e n t i s, „*Urso en montoj*”, 1906). „*Konkir'i*” (kun referenco al *Vortaro franca-esperanta de la Presa Societo*, 1908) resendas al *konker'i*. Same „*konkvest'i*”, post kiu troviĝas demanda signo pro „la ebla vortludo: *konk-vesti*”.

⁷⁾ En la dua parto (1910) de l' B o i r a c-*Vortaro* (p. 245) troviĝas „*paŭsi*”, kun referenco al „*Teknika Vortaro*” (t.e. „*Enciklopedia Vortareto*”, 1910) de V e r a x kaj kun jena difino: „*transkopii, transdesegni, dekalki*”; tiu ĉi lasta vorto aperas en la *Aldono* de B o i r a c (p. 354), kun referenco al la „*Vortaro polo[tiel!]-esperanta*” supre menciita (1910); tamen, por eviti ajnan eblecon de konfuzo kun la radiko *kalk'*, mi preferas uzi la francan infinitivon „*calquer*” (legu: *kalke'*) por formi Esperantan radikon kun fina vokalo homonimevita (analoge al *lupeo, moleo, paneo, steleo*). En la nova „*Franca-Esperanta Vortaro*” de R. L é g e r kaj A. A l b a u l t (1961) enestas jam *kalkeo*, lingvistika termino (p. 83), *leksiko* (= vorttuto; p. 320), kaj krome la formo *sovjeto* (p. 567), kaj la gramatikaĵo *temato* (p. 606), samsignifa kiel *stama* (uzita ĉi-supre, en postnoto g).

⁸⁾ Kompreneble ankaŭ en la vortaroj kiuj referencas al V e r a x, kiel tiu de B o i r a c (supre menciita) kaj „*Dictionnaire Complet E-Français*” (1910; dua eldono kun referencoj, 1921), same kiel en tiuj bazitaj nur, aŭ ĉefe, sur *Plena Vortaro* (inkluzive de la *Suplemento*).

LA VORTSPECOJ DE LA SUBJEKTA PREDIKATIVO KAJ DE LA PASIVA PARTICIPO

de R. LINSE

La subjekta *kvalita* predikativo estas ĉiam adjektivo, se la subjekto estas substantivo, pronomo, numeralo, adjektivo aŭ vorto iu ajn, pri kiu oni ion asertas, sed kiam la subjekto estas infinitivo aŭ tuta propozicio, oni plimulte uzas adverbbon. Tamen ankaŭ adjektivo estas uzata, kaj tio kelkfoje de Z a m e n h o f.

En la frazo:

„*Kiun lingvon vi uzos por tiu celo, tio estas por la afero tute egala*” oni ĉiam uzas adjektivan formon por la subjekta predikativo (*egala*) kiu determinas „*tio*” kiel anstataŭanton por la propozicio:

„*Kiun lingvon vi uzos por tiu celo*”

Per la demonstrativo *tio* la determinita propozicio estas emfazita. Forigo de la emfazo per subkompreno de *tio* ne kaŭzas ŝanĝon en la restanta frazo, la predikativo konservas sian adjektivan formon kaj ni havas:

„*Kiun lingvon vi uzos por tiu celo, estas por la afero tute egala*” (Z.: Orig. Verk. 36/9).

Ni citu ankoraŭ kelkajn frazojn de Z a m e n h o f, en kiujn ni interkrampoj enkondukas la emfazan „*tio*”:

„*Sed kunligi jam antaŭe la sorton de l'lingvo internacia kun la estonta kongreso, (tio) estus tre malprudenta*” (O.V. 31/33).

„*Ĉu (tio) ne estas ebla, ke ni kompreniĝadu per alia lingvo*” (Hamleto, Akto V, Sceno 2), *)

„*Por mi persone (tio) estus kompreneble pli oportuna teni la sorton de l'lingvo internacia en miaj manoj*” (O.V. 36/32).

(*Tio*) „*estus tre utila tute precizigi kaj klarigi la rolon de la Oficejo*” (Leteroj de Z. II. 285/24).

Estas evidenta, ke oni ĉiam, kiel en la donitaj ekzemploj, povas uzi adjektivon kaj neniam bezonas uzi adverbbon kiel *kvalitan* predikativon, ankaŭ se la subjekto estas infinitivo aŭ tuta propozicio, ĉar en la per *tio* emfazita frazo la adjektiva formo ja ĉiam estas korekta. Kelkaj ekzemploj kun konsekvenca uzo de adjektivo por la *kvalita* predikativo, sendepende de la speco de la subjekto, estas donataj en la tabelo sub 1.

*) Citita el Paul F r u i c t i e r: *Esperanta Sintakso, laŭ verkoj de S-ro D-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj*, Paris 1903, Presa Esperantista Societo. En la antaŭparolo la aŭtoro diras, ke li uzis la unuajn eldonojn de tiuj verkoj, ĉar en ili ne estas alportitaj ŝanĝoj de aliaj personoj.

Tabelo.

1. Subjekta kvalita predikativo:	2. Kunmetita tempo kun pasiva participo:	3. Objekta kvalita predikativo:
Leono estas forta	La leono estas kaptita	Li trovis la leonojn forta
Tio estas bela	Tio estas plibeligita	Li trovis tion bela
Tri estas nepara	Tri estas klasigita nepara	Oni klasigas tri nepara
La senfina malfacile estas komprenebla	La senfina malfacile estas komprenata	Oni trovas la senfinan malfacile komprenebla
„Kaj” estas mallonga	„Kaj” kelkfoje estas mallongigita	La grekoj trovas „kaj” belsona
Fumi estas certe streĉa por la koro	Fumi en benzina provizejo estas malpermesita de la polico	Li trovis fumi senteble streĉa por la koro
Ĉu li sukcesos estas iom dubinda	Ke li sukcesos estas atendata de ĉiuj	Oni opinias ne tre verŝajna ke li sukcesos

Se oni en esprimoj kiel: „*bona gimnastiki*” uzus adverbos (*bone*) por la predikativo kun infinitivo (*gimnastiki*) kiel subjekto, la predikativo havus la saman formon (*bone*) kiel adjekto al la verbo (*gimnastiki*) kaj sekve la frazo havus du sencojn. La konsekvenca uzo de adjektivo por la subjekta kvalita predikativo, ankaŭ kiam la subjekto estas infinitivo, distingus la du sencojn:

bona gimnastiki — estas bona gimnastiki
bone gimnastiki — (li povas) bone gimnastiki

Ankoraŭ ekzemploj estu donataj:

<i>avida ŝparegi</i>	<i>avide ŝparegi</i>
<i>facila venki</i>	<i>facile venki</i>
<i>interesa studi</i>	<i>interese studi</i>
<i>ebla solvi la problemon</i>	<i>eble solvi la problemon</i>
<i>honesta pagi siajn ŝuldojn</i>	<i>honeste pagi siajn ŝuldojn</i>
<i>kruela mortigi bestojn</i>	<i>kruele mortigi bestojn</i>
<i>komforta vojaĝi per aviadilo</i>	<i>komforte vojaĝi per aviadilo</i>
<i>kuraĝa savi dronanton</i>	<i>kuraĝe savi dronanton</i>
<i>prudenta zorgi por la estonto</i>	<i>prudente zorgi por la estonto</i>

La pasivon de verbo oni ricevas per la helpa verbo *esti* kaj la adjektiva pasiva participo. Tio estas ĉiam regulo, se la subjekto estas substantivo, pronomo, numeralo, adjektivo aŭ vorto iu ajn, pri kiu oni ion asertas, sed kiam la subjekto estas infinitivo aŭ tuta propozicio, oni plimulte faras escepton de la regulo kaj uzas la adverbos formon por la participo. Tamen Zamenhof en tiu okazo diversfoje uzis la adjektivan formon, kiel ekzemple:

„*ĉar krei ilin mem estus ne permesita*” (O.V. 35/40);

„*Sed tute ne estas postulata, ke vi aŭ via adresito sciu la lingvon francan*” (O.V. 36/16);

„*Sed estas tamen dezirata, ke tiaj aliformigoj estu farataj nur en okazo de efektiva neceso*” (O.V. 53/21);

„*por atingi la plej mallongan formon de la lingvo estas permesita oferi por ĝi ĉiujn aliajn efektive gravajn kondiĉojn*” (O.V. 274/9).

Kelkaj ekzemploj kun konsekvenca uzo de la adjektiva formo de la participo sendepende de la speco de la subjekto estas donataj en la tabelo sub 2.

Estas malfacila trovi objektivajn motivojn por deflankiĝi de la konsekvenca uzado de adjektivo por la subjekta kvalita predikativo kaj de la konsekvenca uzado de adjektiva formo por la participo ĉe la pasivo de verbo kiam la subjekto estas infinitivo aŭ tuta propozicio.

Pri la objekta kvalita predikativo neniu dubo ekzistas. Al tiu oni senescepte kiel finajon aldonas la adjektivan *a*, ne nur kiam la objekto estas substantivo, pronomo, adjektivo, numeralo aŭ iu ajn vorto, al kiu la ago de la subjekto direktiĝas, sed ankaŭ kiam la objekto estas infinitivo aŭ tuta propozicio, kiel la ekzemploj en la tabelo sub 3 montras.

Analoge al la senescepta uzo de la adjektiva formo de la objekta kvalita predikativo ŝajnas koncerne la subjektan kvalitan predikativon esti tute konsekvenca sammaniere ĉiam uzi la korektan adjektivan formon, sendepende de la sorto de la subjekto, ankaŭ kiam tiu estas infinitivo aŭ tuta propozicio.

Dunkehallav 22

Jönköping, Svedujo.

Redakcia Postnoto. — La Redakcio invitas al diskuto pri ĉi tiu temo. Jam nun mi volas fari kelkajn rimarkojn:

Se la subjekto estas numeralo aŭ adverbo de kvanto, ankaŭ la predikativo subjekta povas esti adverbo, ekz.: „tri estas malmulte”. La klarigo estas ke ĉi tiu predikativo ne estas kvalita, sed kvanta. Tamen, diri: „tio estas malmulte”, estus malĝuste(a).

Kaj kio pri la sensubjektaj esprimoj de la tipo: „*Estas varme!*” - „*Estis dancate*” - „*Estas bele tie ĉi!*”? Ĉu tiuj predikativoj restu adverbaj?

Al ĉi tio s-ro Linse i.a. respondis, ke oni ja povas diri: „*Tri estas malgranda* [nombro]”, sed ne: „*Tri estas malmulta*” aŭ „*malmulte*”; kaj ke, ĉar oni diras: „*valso estis dancata*”, oni ankaŭ diru, „*estis dancata*” subkomprenante *danco*. Sed ĉu tiuokaze oni ne devus preferi diri: „*estis dancataj*”?

Nu, mi diru, ke mi ne konsentas kun s-ro Linse, nek pri „*tri estas malmulte*”, nek pri „*estis dancate*”.

En ĉi-pria letero Prof. W a r i n g h i e n referis al „*Lingvaj Respon-
doj*” 3a eldono, p. 50-51, konkludante ke senvaloraj estas ekzemploj el
la unuaj jaroj [antaŭ 1891]. Komento pri ĉi tiu punkto troviĝas en la
Plena Gramatiko (2a eldono, § 297). Pri la kompleksa karaktero de la
nombronomoj vidu la *Plenan Gramatikon*, 3a eldono, § 87.

632.937.1(51)

INSEKTOJ KONTRAŬ INSEKTOJ

de LU Chin-sheng

Estas multaj plagoj en agrikultura produktlaboro, el kiuj la agado
de malutilaj insekto ofte kalkuliĝas kiel la plej danĝera, ĉar ili povas
en tre mallonga tempo formanĝi la tutan foliaron aŭ alian parton de la
plantaĵo. Oni devas elpensi metodojn por defendi siajn rikoltojn.

En Ĉinio post liberiĝo en 1949, sub la zorgado de la Ĉina Komunista
Partio kaj la Popola Registaro, oni tuj komencis kontraŭbatali la
plaginsektojn, kiujn la Kuomintanga Registaro malsukcesis aŭ simple
neglektis subigi. Ni akiris seriojn de grandaj sukcesoj en nia laboro kaj
la rekta rezulto estas, ke nia rikoltkvanto multe pliigis. Plantaĵpro-
tektado jam nun fariĝis unu el la „Ok Leĝoj de Agrikulturo”.

Aparte de la hemiaĵoj, ni ankaŭ grandskale utiligas la biologian
metodon, t.e. parazitojn kaj aliajn insektomanĝantajn insektojn en
servo al nia celo. Ni mobilizis ĉiujn por elradiki la plagojn.

Inter la parazitoj, ni jam utiligis *Trichogramma evanescens* West-
wood (por *Pyrausta nubilalis* Hübner, *Chilo suppressalis* Wlk., kaj
aliaj fiinsektoj el familio *Pyraustidae*), *Dibrachys cavus* Wlk. (por tra-
vintrantaj larvoj de *Platyedra gossypiella* Saunders) en kotontenejo.
Aphelinus mali Haldeman (por *Eriosoma lanigerum* Hausm.) kaj aliajn.
Inter la karnivoraj insektoj, ni jam utiligis *Rodolia rufopilosa* Muls.,
R. cardinalis Muls. kaj *Cryptolaemus montrozieri* Muls. por kontraŭ-
batali la kokcidon *Icerya purchasi* Maskell. En tiu ĉi lukto ni rikoltis
rimarkindajn sukcesojn. Tamen ni ne preterlasis la utilajn mikrobojn.
En nia laboro elradiki la sojinsekton *Grapholitha glycivorella* Mats.
ni sukcesis mobilizi la fungon *Beauveria bassiana* (Bals.) Vuill. Sendube
ni utiligos pliajn fortojn el ĉi tiu kategorio.

— Adreso: Lu Chin-sheng, Nordokcidenta Kolegio de Agrikulturo,
Wukung, Shensi, Ĉinio.

408.92(081) (E(081))

Gaston W a r i n g h i e n: **Lingvo kaj Vivo**. Esperantologiaj Eseoj.
N-ro I de nova serio de Stafeto: „Movado”. 450 p., 22 × 16 cm².
Prezo: \$ 4,00 por bindita, \$ 3,40 por broŝurita ekzemplero.

Ĉi tiu libro de nia eminenta esperantologo, Prof. W a r i n g h i e n,
dediĉita „memore kaj honore al Lazaro L. Z a m e n h o f, apostolo de la
paco, 1859-1917” - (se oni nepre volas uzi romajn ciferojn, oni faru tion
korekte) - estas vera frandaĵo por esperantistoj kiujn interesas ilia ling-
vo. La libro konsistas el 3 partoj: **I. Nia Lingvo, II. Niaj Problemoj, III.
Niaj Perspektivoj**. Inter ni la partoj I kaj III ne kaŭzos disputojn, kio ne
signifas ke ili ne estas ege interesaj kaj pensigaj. La disputojn kaŭzas,
kompreneble, niaj *problemoj*.

En la unua parto la aŭtoro analizas plurajn fragmentojn de *praes-
perantoj* el 1878 kaj 1881 por eltrovi la vojon laŭ kiu Esperanto fariĝis
kia ĝi estas. Montriĝas, ekzemple, ke akuzativo tiam tute mankis aŭ
nur troviĝis ĉe pronomoj. Nur en unu fragmento (de *La Rabistoj* de
Schiller) Z a m e n h o f provis akuzativan finaĵon (l) ankaŭ ĉe
substantivoj kaj adjektivoj, proksimume kiel en la nuna Esperanto. En
aldona noto W a r i n g h i e n donas ankoraŭ tri variaĵojn de „*Patro
nia*” el 1894 - la tempo de la reformproponoj - kaj analizas ilin.

La dua eseo titoliĝas: *Etimologiaj Esploroj*, kaj interesos ĉiujn, kiuj
interesiĝis pri la artikolo de s-ro G r e g o r en Sc. R. 9 92 pri „La Fon-
toj de Esperanto”. La tria eseo, „*La Fundamento de Esperanto*”, havas
du partojn: *I. Historia Aspekto*, kaj *II. Vortkonstrua Signifo*, nombras
28 paĝojn, estas tre grava kaj donas multe pli ol sugestas la titoloj. W.
montras ke en nia hodiaŭa Esperanto troviĝas formoj kiuj devenis el
diversaj stadioj de la estiĝo de nia lingvo. Li montras kiel Z a m e n h o f
strebis al mallongeco de la radikoj kaj al evito de homonimoj (io pri kio
pli atentu la hodiaŭaj kaj estontaj kreantoj de novvortoj!), kaj ke tio
kondukis al devioj disde la fontolingvoj. Siavice tio kondukis al kritikoj
kaj reformproponoj. Tamen la juna lingvo - ankoraŭ ne havante tra-
dicion devigantan al respekto - bezonis stabilecon. Z a m e n h o f-on
evidente inspiris la ekzemplo de la Malnova Testamento - la netuŝebla
libro kiu kuntenadis la hebrea genton tra la jarmiloj, kaj li efektive
sukcesis garantii la stabilecon de Esperanto per la solena akceptigo de
la Fundamento en Bulonjo-ĉe-Marco en 1905. Post tio W. analizas la
sorton de la Fundamentaj vortoj en la evoluo de la lingvuzo. Mi estas
tentata citi el ĉi tiu parto - sed ĉar mi estas same tentata citi el multaj
aliaj partoj, mi provos rezisti al la tento. Vi aĉetu mem, legu, studu
mem ĉi tiun majstran libron.

La kvara eseo, titolita „*La Originala Strukturo de Esperanto*”, havas
jenajn partojn: *I. La Vorto*, kaj *II. La Frazo*. Ĝi estas ege interesa
kaj multe helpas nin pli bone kompreni la esencon de nia lingvo, kiu
- malgraŭ la ŝajno - fundamente diferencas de la hindo-eŭropaj lingvoj.

412.021

E 223

E 221.1

E 221.2

E 20